

第2期
2017-12

黄河 Flava Rivero

Duonjara Revuo



河南世界语者联盟
Henan-a Esperantista Grupo

目 录 Enhavo

3	Okazis la 2a Henan-a Esperantista Kongreso	Konlo
4	第 2 届五省市世界语论坛在沪开讲	康乐
6	第 2 届河南世界语者大会纪实	孔雷
10	Ĉarma urbo Zhengzhou en linio de la Zono kaj Vojo	Konlo
12	Komparado de la angla lingvo kun Esperanto	Cao Ruiming
17	Tra dentoj videblas la japana socio	HORI Jasuo
21	Serĉado de Songô	Bakin
24	100 个必会热词	熊林平 译
28	缅怀迟铁男先生	赵云峰
29	我们的生活充满阳光	侯志平
30	世运短波	孔雷
31	什么是河南话?	王天义



黄河 (Flava Rivero) 2017 年 12 月 第 2 期

主 办：河南世界语者联盟
编 辑：《黄河》编辑部
出 版：世界语工作室
主 编：孔 雷 张雪松
投稿邮箱：redakcio@126.com
下载网址：www.flavarivero.top



Okazis la 2-a Henan-a Esperantista Kongreso en Anyang-urbo

De la 20-a ĝis la 22-a de oktobro 2017 en Anyang-urbo okazis la 2-a Henan-a Esperantista Kongreso, organizita de Henan-a Esperantista Grupo(HEG) kaj Anyang-a Esperantista Grupo(AEG). La kongresa temo estas Lernado kaj Vojaĝado. La kongreson ĉeestis 26 esperantistoj el provincoj Henan, Shaanxi kaj Liaoning. Dum la kongreso oni okazigis interkonan vesperon, laŭtleĝadon, teman prelegon, teman kunsidon ktp. Post la kongreso partaj esperantistoj vojaĝis al la Granda Kanjono de la Monto Taihang en la 23-a de oktobro.



Matene de la 21-a de oktobro, inaŭguriĝis la 2-a Henan-a Esperantista Kongreso en la Komerca Hotelo Huamao de la urbo. La malferman ceremonion prezidis s-rino Wang Min, ĝenerala sekretariino de HEG. Post kantado de La Espero prezidanto Ma Haibin faris inaŭguran parolon. vicprezidanto Jiang Guodong raportis la preparan laboron de la kongreso. S-ro

Cheng Lingjin honora prezidanto de AEG faris la bonvenigan paroladon. Al la kongreso gratulis reprezentantoj el urboj Zhengzhou, Kaifeng, Luoyang, Xinxiang kaj Anyang, kaj ankaŭ 3 gastoj el provincoj Shaanxi kaj Liaoning gratulis al la kongreso. Por esprimi sian gratulon s-ro Huang Yinbao, la ĉefredaktoro de Unesko-Kuriero en Esperanto sendis artikolon pri Unesko-Kuriero al la kongreso. Sinjoro Liu Jiahe, la honora prezidanto de HEG faris la dankan parolon. Post la inaŭguro kongrestemajn prelegojn faris unu post la alia sinjoro Ĉielismo Wang, prezidanto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) kaj prezidanto de Xi'an-a Esperanto-Asocio, kaj sinjoro Zhao Chenghua, vicprezidanto de IKEF kaj vicprezidanto de Shenyang-a Esperanto-Asocio. Sinjoro Zhang Wei, veterana esperantisto el Dandong-urbo de la provinco Liaoning konigis al la ĉeestantoj la cirkonstancon pri internaciaj kunvenoj.

La sekvantan tagon fermis la 2-a Henan-a Esperantista Kongreso. S-rino Zhao Hua estis elektita kiel ĝenerala sekretariino de HEG, ĉar la grupo ĉiujare praktikas alternan sistemon de ĝenerala sekretario. Vicprezidanto Ji Feng prezidis la ferman ceremonion. Anyang-aj esperantistoj transdonis la verdstelan flagon al Zhengzhou-aj esperantistoj. Vicprezidanto Konlo faris la ferman paroladon kaj esprimas al diverslokaj esperantistoj bonvenon en Zhengzhou-urbon. (Raportis **Konlo**)

第 2 届五省市世界语论坛在沪开讲

康乐

2017年11月3日至5日，第2届五省市世界语论坛在上海市崇明岛江南三民文化村举行。来自上海、浙江、河南、江苏、陕西等五省市近40名世界语者参加了上海论坛开幕式、演讲活动、相识晚会、文娱晚会和闭幕式等活动。乘着党的十九大的东风，沪浙苏陕豫五省市世界语论坛在上海开启了新时代的新篇章。

11月3日下午，第2届五省市世界语论坛开幕。上海市世界语协会秘

书长周天豪主持会议，上海市世界语协会会长汪敏豪致欢迎词，上海市世界语协会唐勇、周天豪秘书长，浙江省世界语协会秘书长朱宝龙、河南世界语者孔雷分别做了主旨演讲。晚上，世界语者们频频举杯，祝贺友谊，又在高兴相识的气氛中开始了自娱自乐的相识晚会。上海世协汪会长和江苏世协汪琳副秘书长情歌伴舞引领助兴；在萨克斯的伴奏下，歌声此起彼伏；结识新朋友，不忘老朋友，愿我们都是好朋友，把世界语者们带进友谊的旋律。笑声，掌声，欢呼声，在这个夜晚回荡……



11月4日，论坛继续精彩开讲。上海市世界语协会周天豪秘书长主持论坛，活动主题是：用世界语连接世界——一带一路背景下的时代新机遇。首先，上海市世界语协会汪敏豪会长演讲了陕西世界语协会王天义会长提供的《破解一带一路文化壁垒的钥匙——世界语》，接着江苏省世界语协会副秘书长汪琳演讲了《一带一路先驱郑和》，上海市世界语协会张涵演示了徐靖的PPT+语音《一带一路、新媒体与世界语的联想》演讲。

一个个演讲精彩登场，一次次震撼听众心灵。“一带一路”在造福世界的同时，也给世界语的发展带来新的契机。通过论坛交流，与会者看到了一带一路的前景，领略了世界语的价值所在，获得了创新智慧灵感，增

添了做好世界语工作的信心与勇气。世界语者们表示，联合在一带一路上推进世界语事业发展。

11月4日晚，举行了文娱晚会。世界语者们翩翩起舞，放声歌唱，这边萨克斯奏响，那边又歌声嘹亮。河南豫剧，瑜伽表演，诗歌朗诵，……一个个娱乐节目登场亮相。特别是上海崔之骏和汪敏豪两位老世界语者的真情友谊与道白感动了在场的每一个人。最后，大家手拉手跳起来，把世界语者们之间的友谊演绎得那样尽善尽美。这个欢悦的晚会真是令人难忘。

11月5日上午，论坛闭幕。上海市世界语协会秘书长周天豪主持闭幕式，会议通过了新乡市世界语协会承办第3届五省市世界语论坛。上海市世界语协会汪敏豪会长向新乡市世界语协会刘家和会长转交了论坛旗帜。

此次论坛还举办了“茶与爱”国际微电影展映及朗读活动，促进了相互了解，增进了友谊，取得了圆满成功。

第2届河南世界语者大会纪实

孔雷

2017年10月20日至22日，第2届河南世界语者大会在中国历史文化名城、甲骨文发祥地安阳举行，来自河南、陕西、辽宁的26名世界语者参加了会议；河南世界语者又昂首向前迈出了坚实的一步，乘着党的十九大召开的东风走进了新时代。大会主题是“学习与旅游”。会议期间，与会者聆听了国际世界语经贸联盟主席王天义、副主席赵承华发表的主旨演讲和辽宁丹东资深世界语者张伟先生关于国际世界语会议情况的介绍，并围绕大会主题“学习与旅游”进行了热烈讨论，纷纷表示“同读一本书，同说世界语，同唱希望歌”，努力为新时代河南世界语运动发展贡献力量。

结识新朋友 畅谈叙友谊

20日中午那天我们郑州世界语者跟开封的同志会合后一起乘K600列车前往安阳，由于列车晚点两个来小时，我们几乎跟来自辽宁丹东的张伟先生同时到达安阳，一前一后乘26路公交车抵达华茂商务酒店报到，结

果竟让来自东北沈阳的赵承华先生抢先成为参会报到的第一人。晚上8点来钟，洛阳世界语者一行4人也匆匆赶到，最后一个出场的当然是“大腕”级人物——国际世界语经贸联盟主席王天义。河南世界语者简短的碰头会，协商了会议有关事宜，然后安阳同志为各地世界语者准备的接风晚宴开始。世界语者们频频举杯祝酒欢庆相聚安阳。晚宴后，相会的新老朋友们径直来到会议室，在“相识晚会”上进一步深入交流。大家坐定，又是王天义先生最后一个进门，在众人嬉笑声中他直接成为率先自我介绍的第一人。他一开口就用世界语侃侃而谈，语速不快，发音清晰，话语简单明了，当即引起了大家的关注与兴趣。特别是他提到自己也是河南人，更是拉近了与河南世界语者之间的距离。就这样，世界语者们你一言我一语都打开了话匣子，谈得无拘无束。时针渐渐指向晚上10点，因为次日就要举行开幕式，大家只好恋恋不舍地说“晚安”。



希望歌中大会开幕 专家演讲共话未来

10月21日，这天一早，新乡世界语者一行4人在刘家和会长的带领下也赶到会场。上午9时许，第2届河南世界语者大会正式召开。河南世界语者联盟第二任秘书长王敏主持开幕式。会议在庄重的《希望》歌声中拉开帷幕，河南世界语者联盟总干事马海滨致开幕词，副总干事蒋国栋作大会筹备工作报告，安阳世界语者联盟名誉总干事成令瑾致欢迎词。郑州世界语者联盟、新乡市世界语协会等世界语组织和个人先后向大会表示祝贺。国际世界语经贸联盟负责人和辽宁省丹东市世界语者张伟也亲临现场向大会表示祝贺。联合国教科文组织世界语版《信使》杂志主编黄银宝先

生向大会提供了交流材料《主动承担国际义务,努力编好〈信使〉杂志——联合国教科文组织世界语版〈信使〉杂志介绍》,以此表示祝贺。河南世界语者联盟名誉总干事刘家和致答谢词,向祝贺嘉宾和本省世界语组织及个人表示感谢。

大会主题是“学习与旅游”。开幕式结束后,国际世界语经贸联盟主席王天义第一个开讲。他演讲的主题是《Kio estas Henan-a lingvo?》他从“河南在世界哪里”展开,用世界语讲述了河南方言的演变。紧接着国际世界语经贸联盟副主席赵承华以

《乡村旅游可持续发展问题及路径选择》为题进行了演讲。辽宁丹东世界语者张伟也就学习世界语、参加国际世界语大会进行了介绍。当天下午,与会世界语者参加了《柴门霍夫博士和世界语》朗读活动,并一起参观了中国文字博物馆。当天还即兴进行了文娱晚会,会上洋溢着世界语者的友情与欢乐。

在三位资深世界语者的引领下,与会者22日上午围绕大会“学习与旅游”的主题进行了座谈交流。说到世界语旅游,洛阳赵红霞兴高采烈地谈了起来,好象是在自由自在的演讲。安阳任冰蕊开门见山说:喜欢旅游,走出去参加户外活动,接触当地地域文化,真的很好。她提议,把世界语平台扩展开来,汇聚每个人的力量,慢慢做,逐步做大。新乡刘家和谈了他自己从事世界语活动的经验,那就是文艺演出+论坛+旅游,有利于世界语的宣传与发展。新乡贾荣霞介绍了新乡世界语协会的做法,世界语艺术团把排演节目和学习宣传世界语融为一体,随时随地学说几句世界语,演出时带着绿星旗做宣传,扩大了世界语影响。安阳刘志权说:把世界语信念、旅游经济与世界语运动相结合,发展、推动、提高,这才是我们真正世界语者的使命。实现我们的追求,要靠每个世界语者的不懈努力。沈阳



赵承华提出：党的十九大指明了新时代前进的方向，我们要抓住机遇，乘势而上，弯道超车，冲上去与时俱进；河南最大的优势就是历史悠久，文化深厚，旅游资源丰富，要把世界语旅游做成品牌，共创共享。丹东张伟当即表示：世界语者们到丹东、朝鲜、韩国，都能够给大家提供帮助。大会主题座谈会上，大家热烈讨论，表示将“同读一本书、同说世界语、同唱希望歌”，逐步提高世界语水平，用这种人类共同语走向世界。

大会成功闭幕 会后号兴参观旅游

10月22日，大会在安阳市闭幕。会议讨论决定河南世界语者联盟实行轮值秘书长制度，通过赵华同志担任河南世界语者联盟第3任秘书长，同时确定第3届河南世界语者大会在省会郑州举行；会上还研讨了《河南世界语运动简史》一书的编印工作，组成了《简史》编委会，一致同意明年4月完成编印工作，以此纪念河南世界语者“五一座谈”35周年。大会达成了“加强合作，携手发展”的共识。当天上午，河南世界语者联盟副总干事吉峰主持闭幕式，向河南老世
界语者成令瑾、刘家 and 颁
名同志颁发

了“柴门霍夫奖”，向张磊等4
了《柴门霍夫博士和世界语》朗读
“优胜奖”，授予赵红霞等10名
同志“优秀世界语者”称号。闭
幕式上，安阳世界语者向郑州世
界语者转交了绿星旗，河南世
界语者联盟副总干事孔雷致
闭幕词，欢迎各地世界语者
明年到郑州来。

大会闭幕后，世界语者们意
犹未尽，辽宁丹东和河南新乡、郑州、开封
的同志在安阳刘志权同志的陪同下当天下午游览了世
界文化遗产——殷墟，甲骨文发现地，参观了殷墟博物馆，再次
领略了安阳作为八大古都之一的殷商文明的博大精深与文明魅力。安阳半
日游的目的地是中国文字博物馆。一片甲骨惊天下。目前，殷墟甲骨文字
数总共近4500个，其中可释字在1500个左右。从甲骨文造字，到战国时



期齐、燕、晋、楚、秦五大文字体系逐步走向文字一统；从印刷术到信息化，从汉字拼音方案到汉字输入计算机，进入网络信息时代；从文字博物馆展示的文字发展历程，世界语者们深受启迪，也仿佛看到了世界文字的发展之路，对世界语运动的网络新时代充满了憧憬。从文字博物馆出来，同志们打出绿星旗合影留念，也吸引了安阳师范学院大学生的目光；西安、丹东、新乡、安阳等地的世界语者们抓住机会向他们宣传世界语，大学生们对世界语也很好奇，并且跟安阳世界语者互留了联系方式，表示愿意进一步了解和学习世界语。这给安阳同志们搞好世界语工作带来了新希望。

会后一日游，又在期待着我们。辽宁沈阳、丹东和河南郑州、开封的6位世界语者，在安阳宋和平、王敏、任冰蕊同志的陪同下，一起游览了林州太行大峡谷。进入景区观赏飞龙峡——绝壁丹崖，穿过“之”字形峡谷，沿步云栈道步入“天境”，无限风光在险峰，“天路”在向我们展示着曲折的“V”字形之途。特别是飞来的“白云岩”，巨大的滚石从天而降，令人无不赞叹大自然的力量。

在安阳的三四天里，从20日的“相识晚会”起，到22日大会闭幕，直至23日前往太行大峡谷“一日游”，世界语者们一直沉浸在诚挚交流、友好协作、祥和欢乐的气氛中。安阳，留给我们的是无尽的思索与对美好未来的憧憬向往。

ĈARMA URBO ZHENGZHOU EN LINIO DE LA ZONO KAJ VOJO

Konlo

Mia E-nomo estas Konlo. Tiun plumnomon s-ro Ĉielismo Wang ĉijare donis al mi. Mi estas esperantisto el Zhengzhou-urbo, kiu estas mia naskiĝ-urbo. Sendube mi amas Zhengzhou. Do, ĉi tie mi konigas al vi ĉarman Zhengzhou.

Zhengzhou situas en la mezo de la centro-ĉina provinco Henan kaj ĝi estas politika, ekonomia, scienca, teknika kaj kultura centro de la provinco, kaj havas longan historion. Kiam ni parolas pri la historio de Zhengzhou, ni nature mencias "Shangdu" (ĉefurbo de Shang-dinastio). Zhengzhou estas unu el la ok antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Antaŭ 3600 jaroj Zhengzhou formiĝis ĉefurbo de Shang-dinastio.

Komerca aktivado de Zhengzhou viglis en Shang-dinastio. En la komenco de la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento grandaj magazenoj ĉirkaŭ la placo Erĉi komencis eniri en komercan konkuradon, oni nomas la konkuradon “Komerca Milito”, pro kio Zhengzhou havas alian nomon Komerca Urbo. Ĝis nun Zhengzhou estas unu el la gravaj komercaj urboj laŭlonge de la Zono kaj Vojo. Tie funkcias moderna komerca reto. Ekde la jaro 2013 trajno de Ĉinio al Eŭropo forveturas de Zhengzhou al Hamburgo. Ĉijare la trajno havas 4 jarojn. La itinero de la kuranta trajno inkludas 121 urbojn en 24 eŭropaj, rusiaj kaj mez-aziaj landoj. En aŭgusto 2017 interretaj specialistoj el en- kaj eksterlandoj kolektiĝas en Zhengzhou por esplori novajn spertojn kaj modelojn pri tutmonda translima ret-komerco. Ili decidis ke la Tutmonda Konferenco pri Translima Ret-komerco funkcias ĉiam en Zhengzhou-urbo.

Menciinde estas, ke en la 14a kaj la 15a de decembro 2015 okazis la 14a kunveno de ĉefministroj el la membroŝtatoj de la Ŝanhaja Kunlabora Organizo. Tial oni nomas Zhengzhou “Internacia Zheng”. Ĝuste pro tio Zhengzhou okupas gravan strategian pozicion en Ĉinio.

Nun Zhengzhou pli kaj pli beliga. Sekvante de ŝtata centrourba konstruado, Zhengzhou komencas tutforte konstrui novan internacian komerc-urbon. Oni povas diri ke Zhengzhou kiel internacia komerca urbo estas plena de ĉarmo. Krome, turistoj al Zhengzhou povas viziti templon Tajĝiĉjunaj Pramajstroj, ankaŭ la miljaran templon Shaolin, la Turisman Regionon de la Flava Rivero kaj aliajn vidindaĵojn.

Unuvorte, Zhengzhou estas vizitinda komerca urbo.



Komparado de la Angla Lingvo kun Esperanto

Cao Ruiming

Kun la rapida progreso de scienco kaj tekniko, la komunikado inter diversaj landoj en la mondo estas tre frekventa tago post tago. La homara socio pli kaj pli bezonas unu komunan lingvon por plenumi sian komunikadon. Tio ĉi estas nemalkonfirma fakto. Tamen, kiu lingvo povas esti uzata kiel homara komuna lingvo?

La unua opinio estas, ke la angla lingvo estas jam vaste uzata en la tuta mondo. Multaj landoj rigardas ĝin kiel gepatran lingvon aŭ leĝe decidita, paralela-oficiala lingvo. La ŝtatoj kies partina lingvo estas la angla, havas fortan ekonomian kaj politikan potencon. Tial la angla lingvo plej eble funkcias kiel homara komuna lingvo.

La dua opinio estas, ke Esperanto kreita de Zamenhof estas scienca lingvo por solvi la homaran lingvo-obstaklon. Ĝi estis artefarite el la ekstrakto de diversaj naciaj lingvoj surbaze de la malsukcesoj de antaŭuloj. Dum pli ol cent jaroj Esperanto jam pruvis sian fortan vivpovon. Ĝi povas esti komparebla kun iu ajn lingvo. Ĝi estas la plej facile lernebla kaj esprimriĉa lingvo el ĉiuj lingvoj. Kun la rapida progreso de scienco kaj tekniko la komunikado en la mondo estas tre ofta tago post tago. Ĉiuj popoloj en la mondo bezonas unu sciencan kaj neŭtralan komunan lingvon. Tial, Esperanto estas la plej ideala lingvo de la homaro.

Mi opinias, ĉu unu lingvo povas fariĝi internacia komuna lingvo aŭ ne, tio dependas de la sekvaj faktoroj:

I . La Internacia Komuna Regulo de la Lingvo

La internacia komuna regulo de la lingvo kaj ĝiaj pureco kaj unueco estas la gravaj kondiĉoj de internacia komuna lingvo. La origina lando de la angla lingvo estas Anglio. Ĉar la Brita imperio ekspansis eksterlanden, multaj ŝtatoj en la mondo fariĝis ĝiaj kolonioj. Granda nombro da anglaj transloĝanoj fluis al eksterlando. Ankaŭ la angla lingvo iris el sia lando al la mondo. Ĝi fariĝis unu nacia lingvo uzata de multaj ŝtatoj. Kun la progreso de historio, la angla lingvo nun

jam estas la oficiala aŭ duonoficiala lingvo de 21 ŝtatoj. Kaj ĝi ankaŭ estas paralela-ofciala lingvo de 16 aliaj ŝtatoj. Multaj ŝtatoj kies patrina lingvo ne estas la angla, rigardas ĝin kiel la unuan fremdan lingvon. Ni ne malkonfesas, ke la angla lingvo jam ludis la rolon de provizora internacia helpa lingvo en la nuna mondo. Sed malgraŭ multe da ŝtatoj rigardas ĝin kiel gepatran lingvon, ĝi ankoraŭ estas nur nacia lingvo, kiu fariĝis nature por kontakto inter nacioj. Kiu ajn internacia komuna regulo de la angla lingvo ne aperis kaj ne eble aperos en historio. Ĉar ĉiu nacio havas sian kutimon, en la angla lingvo aperis multaj variantoj: la usona, aŭstralia kaj kanada dialektoj ktp. Tiuj ĉi variantoj havas tre grandajn diferencojn en fonetiko, gramatiko kaj leksikono. Ekzemple, la angla vorto “dormitory” signifas “loĝdomo” egale en Britio kaj Usono. Sed la diferenco estas ke la angla senco estas “Ĉambro” (a room) kaj la usona senco estas “loĝdomo” (a building). Tial kiam la usona instruisto diras al la angla instruisto ke la gestudentoj en usona universitato dormas en unu “loĝdomo”, la angla estas tre surprizita, ĉar lia kompreno al la vorto “loĝdomo” estas “unu ĉambro”.

El tiu ĉi simpla ekzemplo ni povas konkludi, ke kvankam multaj ŝtatoj rigardas la anglan lingvon kiel gepatran lingvon, tamen ĝi havas tre grandan diferecon inter tiuj ĉi ŝtatoj. La ŝtatoj kies patrina lingvo ne estas la angla lingvo kreis sian kutiman esprimon dum la aplikado de la angla lingvo. Ĉar la angla lingvo ne havas sian purecon kaj internacian unuecon, tial ĝi ne eble fariĝos homara komuna lingvo.

Nun ni parolu pri Esperanto. La celo de Zamenhof estis doni al la homaro unu pacan lingvon, unu komunan internacian helpan lingvon. Ĉar kun la socia progreso la komuniko inter diversaj nacioj estas pli kaj pli ofta, la diferencoj de lingvoj estas la plej granda baro por komuniko de la homaro. Oni diras, ke en la sepa jarcento antaŭ la kristana erao, oni antaŭdiris pri la homara komuna lingvo. Laŭ la historia registro, en la mondo troviĝis pli ol 500 komunaj lingvaj planoj antaŭ la naskiĝo de Esperanto. Sed tiuj ĉi planoj ne povis ekzisti pro iliaj grandaj mankoj en lingva strukturo. Tiuj ĉi lingvoj estas malfacilaj por kompreni, lerni kaj memori. Zamenhof konkludis el la malsukcesoj de antaŭuloj, ke unue, internacia komuna

lingvo devas esti neŭtrala. Tiu ĉi nova lingvo ne devas esti kiu ajn ekzistanta nacia lingvo, sed devas esti nova lingvo kreita sur la fundamento de ĉiuj naciaj lingvoj; ke due, ĝi devas esti simpla por lerni kaj esti esprimriĉa. Nur tiel, ĝi estas facila por popolo lerni kaj uzi. Laŭ tiuj ĉi du reguloj, kiam Zamenhof publikigis tiun ĉi lingvan planon, li starigis 16 principajn gramatikajn regulojn. Pli ol cent jaroj pasis, la 16 gramatikaj reguloj ne ŝanĝiĝis. Esperanto ankaŭ ne evoluis al alia dialekto, kaj ankaŭ ne havas ĉiun ajn varianton en la lerno, disvolviĝo kaj uzo de ĉiuj nacioj en la mondo. Kontraŭe, kiuj ajn homoj lernas Esperanton, ili ĉiuj pene protektas ĝian purecon kaj unuecon, kaj ne aldonas iun ajn patrinlingvan uzadon al Esperanto. Alie, la disvolviĝo de Esperanto estas nur en leksikono, kaj ĝia fonetiko kaj gramatiko ne ŝanĝiĝos, ĉar ĝi estas artefarita lingvo. Tial, Esperanto povas ĉiam konservi sian unuecon, purecon kaj interacian regulon. Kaj ĝi eble fariĝos homara ideala komuna lingvo.

II. La Neŭtraleco de la Lingvo

La dua necesa kondiĉo de la internacia komuna lingvo estas ĝia neŭtraleco. Tio estas, ĝi devas esti nova lingvo konstruita sur la fundamento de ĉiuj naciaj lingvoj. Neniu lingvo havas tiun ĉi kondiĉon krom Esperanto, kvankam la angla lingvo estas uzata de multaj ŝtatoj, ĝi ankoraŭ estas nacia lingvo. Tiel nomata nacia lingvon estas tiu kiu formiĝis nature dum la longa produkta laboro de ĉiu nacio por ĝia interkomunikiĝo. Ĝi havas fortan nacian senton kaj nacian sendependan konscion. Multaj ŝtatoj rigardas sian patrinan lingvon kiel la simbolo de sia nacia sendependeco. Eĉ la ŝtatoj kiuj rigardas la anglan lingvon kiel siajn patrinan lingvon havas fortan nacian sendependan senton. Ĝia angla lingvo ankaŭ reliefe havas sian nacian trajton. Ekzemple, antaŭ la jaro 1776, Usono estas ne sendependa, Nord-Ameriko estis kolonio de Britio, Londono estis la centro de politiko kaj kulturo. La lingvaj reguloj estis determinitaj de Londono. Post sendependeco la naciisma spirito en Usono leviĝis. Oni proponis, ke Usono ne nur akiris politikan sendependecon, ĝi devas ankaŭ akiri lingvan sendependecon. Oni eĉ proponis, ke Usono prenis grekan lingvon aŭ hebrean lingvon kiel sia patrina lingvo por signifi sian sendependecon. La propono estis ne akceptita, ĉar ĝi estis

nepraktika. Sed la usonanoj iomete reformis la regulojn de ortografio kaj prononco por signifi la diferencon de Usona dialekto kaj angla dialekto de la angla lingvo. Tial, se ni uzas iun nacian lingvon kiel la internacian komunan lingvon, ni ne nur ne povas unuecigi la lingvon, kontraŭe ni povas damaĝi aliajn naciajn sentimenton. Nun Esperanto ankoraŭ ne gajnas sian meritan lokon en la internacia komunikiĝo, la angla lingvo efektive estas nuna internacia helpa lingvo. Tio kaŭzis ne egalan staton en internacia komunikiĝo. La ŝtatoj kies patrino lingvo estas la angla, estas en supereca pozicio, kaj la aliaj ŝtatoj estas en malfavora situacio. Ili ne povas lerni bone la anglan lingvon kaj uzi ĝin lerte pro la granda diferenco de nacia kutimo. Tial, Unuiĝintaj Nacioj uzas ses laborajn lingvojn por efike fari internacian komunikiĝon. Multaj ŝtatoj deziras igi siajn patrinajn lingvojn enviciĝi en la laboraj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj por levi sian rolon en internacia komunikiĝo. Laŭ statistiko, Unuiĝintaj Nacioj uzas multe da mono ĉiujare por la traduko de ses laboraj lingvoj. Multaj landoj konsumas gradajn homfortojn kaj materialojn por eduki homojn kompreni aliajn fremdajn lingvojn. La lingva obstaklo alportis grandan ĝenon kaj malŝparon al la homaro. Se la neŭtrala lingvo Esperanto estas uzota kiel la homara komuna lingvo, ĉi tiuj problemoj tuj solviĝos, ĉar Esperanto ne ekskludas ĉiujn ajn naciajn lingvojn, ĝi nur estas homara komuna lingvo ekster naciaj lingvoj. Tial ĝi estas egala al kiu ajn nacio en la mondo. Ĝi ne havas rasan kaj lingvan diskriminacion kaj kulturen invadon. Ĝi ne difektas la senton de kiu ajn nacio. Se Esperanto estas uzata kiel homara komuna lingvo, ĉiuj popoloj en la mondo devas lerni nur Esperanton kaj povas interkomunikiĝi en la mondo. Tio ĉi havos gigantan movfunkcion por la progreso de homara civilizacio kaj por la disvolviĝo de scienco kaj tekniko. Tial la lingva neŭtraleco estas unu el la necesaj kondiĉoj de internacia komuna lingvo.

III. La Simpla, Klara kaj Facillerna Trajtoj de la Lingvo

Se ĉiuj popoloj en la mondo povos lerte uzi unu internacian komunan lingvon, tiu ĉi lingvo devas havi simplan klaran kaj facillernan trajtojn. Tiel, ĝi estas utila por ĉiuj popoloj lerni kaj uzi. Ĉiu homo kiu lernis fremdan lingvon havas tian sperton, ke estas tre malfacile lerni bone alian nacian lingvon krom propra patrino

lingvo. Kvankam la angla lingvo estas iom facila inter ĉiuj naciaj lingvoj, tamen ĝi ankaŭ havas multajn mankojn, ĝia fonetiko estas malfacila, gramatiko kaj fraza strukturo estas ŝanĝema, kaj idiomo estas multa. Alie, la angla lingvo havas multajn variojn. Tio ĉi fariĝas obstaklo por interkomunikiĝo per la angla lingvo en la mondo. Oni opiniis, ke se ni elspezas saman energion kaj saman tempon, ni bezonas kvar jarojn por posedi la anglan lingvon, kaj du jarojn por Esperanton. Tial, Esperanto havas senkompareblan superecon ol ĉiuj naciaj lingvoj kaj havas brilan perspektivon.

IV. La Funkcio de la Lingvo en la Interkomuniko de Kulturo, Scienco kaj Sentimento inter Nacioj en la Mondo

Ĉiu lingvo estas por interkomunikiĝo. La nacia lingvo ludas sentan interkomunan rolon de la propra popolo kaj ludas la rolon por akceli kulturan, sciencan disvolviĝon de la propra nacio. Internacia komuna lingvo devas ludi la rolon por interkomuniki la senton de ĉiuj popoloj en la mondo kaj ludi la rolon de la akcelo de scienco, kulturo en la tuta mondo. Certe mi ne neas la grandan rolon de la angla lingvo en la progreso de scienca kaj teknika disvolviĝo en la mondo. La angla lingvo ludas la rolon kiel momenta internacia helpa lingvo, ĉar ĉiuj popoloj en la mondo urĝe bezonas unu komunan lingvon por internacia komunikiĝo, tamen Esperanto ja ne akiris sian meritan internacian lokon. Ĝuste same kiel la diro de iuj homoj, ke la angla lingvo havas tiel grandan influon kaj rolon pro tio, ke la Ŝtatoj kies patrino lingvo estas la angla, havas grandan ekonomian kaj politikan forton. Tamen, Esperanto estas akceptata de ĉiuj popoloj en la mondo nur per ĝia supereco.

Mi opinias, ke estas nelonge se unu lingvo estas devige akceptita de aliaj nacioj per kultura kaj ekonomia penetro kaj ankaŭ per armita forto. En historio, kelkaj ŝtatoj kaj areoj iam faris la movadon por maluzi la anglan lingvon. Kiel supredirite, nun en internacia komunikiĝo troviĝas malegala lingva problemo. Se Esperanto estas uzata kiel homara komuna lingvo, ĉiuj popoloj en la mondo estos sur sama startpunkto. Ĉiu kiu lernis Esperanto havas tian sperton, ke Esperanto estas kiel patrino lingvo, kaj ne havas fremdan senton. Esperanto povas pli vaste

akceli la interŝanĝon de kulturo, scienco kaj sento inter nacioj, kaj Esperanto povas akceli amikecon inter la popoloj. Ĝi estas paca kaj espora lingvo. Dum pli ol cent jaroj, Esperanto estas jam uzata en ĉiuj kampoj de homara vivo. Ĝi jam faris grandan akcelan rolon al homara paco, scienco kaj tekniko.

Resume, la angla lingvo posedas nenian kondiĉon kiel internacian komunan lingvon, kaj Esperanto havas la kvar kondiĉojn, tial ĝi havas la kompetentecon por fariĝi kiel homara komuna lingvo.

Sed, se ni volas, ke Esperanto vere fariĝos kiel homara komuna lingvo, ni ĉiuj esperantistoj en la mondo devas labori senĉese. Ni devas vidi, ke nun la angla lingvo ankoraŭ havas grandan kutiman forton en internacia komunikigo. Ni ankaŭ ne neas la rolon de la angla lingvo. Ŝanĝi tiun ĉi staton, igi Esperanton akiri ĝian meritan lokon estas longa malfacila laboro. Sed kun la historia progreso, finfine Esperanto povos anstataŭi la lokon de la angla lingvo, vere fariĝi kiel homara komuna lingvo kaj ludi grandan rolon en internacia komunikigo.

参考文献:

1. 威尔斯·JC, 世界语学概论 [M], 北京: 商务印书馆, 1992
2. 曹瑞明, 世界语 [M], 北京: 当代中国出版社, 2004

作者简介: 曹瑞明 洛阳理工学院外语系主任、教授, 研究方向: 英语世界语教学、中西文化对比与翻译。

Tra la dentoj videblas la japana socio


HORI Jasuo [Japanio]

20 dentoj en la aĝo de 80 jaroj

Jam de 15 jaroj mi neniam vizitis kuracistojn, ĉar mi kredas, ke subkorpa baniĝo (matene kaj antaŭ enlitiĝo mi baniĝas entute du horojn por varmigi mian suban korpon) solvas ĉian malsanon, kaj ne multe kredas kuracistojn. Tamen mi vizitas kiel escepto dentiston, ne pro malsanaj dentoj, sed por kontroli la staton de

miaj dentoj, ĉar mi kredas, ke dentoj estas la plej gravaj por mia sano. Ja mi havis kelkajn malsanajn dentojn antaŭ 30 jaroj, sed tiuj jam estis kuracitaj kaj nun mi havas sanajn 32 dentojn. Kiam mi vizitas la kuraciston, mi ĉiam demandas lin, ĉu mi povos havi minimume 20 dentojn, kiam mi estos 80-jara, kaj la respondo estas ĉiam “Certe”. Kial 20 dentojn en la aĝo de 80 jaroj?

La ministerio de bonfarto lanĉis sloganon « 80-jaruloj havu minimume 20



dentojn » en 1989. Se homoj havas 20 dentojn, ili havas neniun problemon maĉi manĝaĵojn, sekve ili povas havi agrablan vivon.

En 2016 la ministerio enketis pri la stato de dentoj inter 3820 homoj ekde 1-jaraj infanoj ĝis maljunuloj. La rezulto montris, ke 80-jaruloj kun minimume 20 dentoj superis 50% la unuan fojon.

75-79-jaruloj : 56,1 % (8,5% pli ol antaŭ 5 jaroj)

80-84-jaruloj : 44,2% (15,3% pli ol antaŭ 5 jaroj)

Laŭ la ministerio la kialoj estas :

1. multiĝo de dentopastoj, kiuj fortigas dentojn.
2. pli da konscio pri la graveco de dentoj.

Fakte pli multaj komoj brosas dentojn pli ol 2 fojojn ĉiun tagon.

1800 gelernantoj havas « detruitan buŝon »

Dum maljunuloj fariĝas pli sanaj rilate al dentoj, 1800 gelernantoj en la gubernio Hjoogo havas « detruitan buŝon ». La asocio de dentistoj en Hjoogo trovis 346 gelernantojn en 97 mez- kaj element-lernejoj, kiuj suferas pro « detruita buŝo », kaj laŭ tiu ĉi cifero la asocio konjektas, ke 1800 gelernantoj suferas pro tio en la gubernio. Tiuj gelernantoj

1. havas pli ol 10 malsanajn dentojn, aŭ
2. perdis plurajn dentojn, aŭ

3. havas malfacilon maĉi.

Kaj iliaj vivkondiĉoj estas

37,1 % de ili vivas nur kun patrino aŭ patro

32,0% de iliaj familioj havas financon malfacilon

33,0% de iliaj gepatroj ne bone zorgas pri ilia sanstato.

La asocio klarigis, ke la tendenco estas sama en ĉiuj gubernioj kaj ke tio estas kaŭzita de malriĉeco.

Malmultiĝas naskiĝoj

En 2016 naskiĝis 976 979 beboj, 28 698 malpli ol en 2015 . Unuan fojon la nombro ne atingis milionon.

Vidu la diagramon. Kiam mi naskiĝis en 1941, naskiĝis 2,5 milionoj da beboj, kaj kiam mia filo naskiĝis en 1966, naskiĝis preskaŭ du milionoj, sed kiam mia nepo naskiĝis en 2010, naskiĝis nur unu miliono. Tre kaj tro da drastaj ŝanĝoj.

Unu el la kaŭzoj de malmultiĝo de naskiĝoj estas malmultiĝo de geedziĝoj. Jen la statistiko :

1970: 1 029 405 geedziĝoj

1980: 774 702

1990: 722 138


2000: 798 138

2009: 714 000

2016: 620 523

La geedziĝoj en 2016 estas la plej malmultaj post la dua mondmilito. Multaj homoj volas geedziĝi kaj havi infanojn, sed pro financa problemo ili ne povas. Multaj devas labori malstabile kun jarkontakto aŭ partatempe, timante eblan maldungiĝon, do al ili mankas mono, sekve ili ne kuraĝas geedziĝi.

Naskiĝoj pli kaj pli malmultiĝas, male mortoj pli kaj pli multiĝas. Nun mortoj



estas pli multaj ol naskiĝoj. En 2015,

Naskiĝoj 1 005 677

Mortoj 1 290 444

Japanio jam komencis ŝrumpi. Laŭ la prognozo de la registaro la loĝantaro de Japanio jene malmultiĝos:

2016: 126 597 000

2030: 116 618 000

2040: 107 276 000

2050: 97 076 000

2060: 86 737 000

La terglobo havas tro multe da homoj, do ĝi dankas al Japanio. En la jaro 2050 ni ankoraŭ baraktos pri la detruita nuklea centralo de Fukuŝima. Ankaŭ tiun tempon ĉu Japanio havos fortan ekonomion kaj sufiĉan laborforton por solivi la problemon tie? Mi havas grandan timon pri tio. Certe la generacio de mia nepo suferos multe.

Malfacila estas vivo de dentistoj


Homoj malmultiĝas, sekve buŝoj malmultiĝas. Sekve ne estas bezonataj multaj dentistoj. En 1990 estis 74 000 dentistoj, sed en 2014, 103 972. Ju malpli iĝas homoj, des pli iĝas dentistoj. Nun la nombro de dentaj klinikoj estas 1,5-oble pli granda ol tiu de oportunaj vendejoj. Subvencio al dentaj kuracadoj restas en la sama nivelo dum la pasintaj 20 jaroj. Oni diras, ke unu el la 5 dentistoj havas malpli ol 3 milionojn da jara enspezo (30000 eŭrojn), dum averaĝa vira enspezo estas 5 milionoj da enoj. Tial okazas bankrotoj inter dentistoj. Oni kutimas pensi, ke dentistoj estas riĉaj, sed nun tio estas mito.

Ĉiun fojon, kiam mi vizitas mian dentiston, mi vidas nur unu aŭ du klientojn. Mi neniam atendas mian vicon. Li dungas du flegistinojn. Ĉu ne estas malfacile por li pagi salajron al ili? Ĉu li povas profiti? Mi volas, ke mia dentisto estu sufiĉe riĉa, sed por helpi lin, mi ne volas havi malsanajn dentojn.

(La aŭtoro estas redaktoro de *Esperanto en Azio*)

Serĉado de Songo

Bakin



Mi perdis songon, meznokte mi vestis min kaj ellitiĝis por ĝin serĉi ĉie.

La ĉielo estas malluma kaj la vojo estas kota, mi ne scias kien mi iros.

Antaŭ mi estas vasta griza nebulo senlima, tial mi povas vidi nek vojon, nek spurojn.

Malantaŭ mi estas ankaŭ vasta griza nebulo, same kiel neĝo kovras ĉion, kaj mi povas vidi neniun homon.

Sen vojo. Do, kien forkuris la songo?

Mi ankoraŭ iras antaŭen. Mi atente paŝas, kaj maltrankviliĝas pro tio, ke mi enfalos en sulko pro falsa paŝo.

Mi aliras antaŭ la pordo de butikoj, sur kies vendotablo estas olea lampo, kaj malantaŭ la tablo sidas blankhara maljunulo. Mi salutas al li kaj demandas ĉu li vidis tion, kion mi perdis.

"Kion vi serĉas, junulo?"

"Songon mi serĉas."

"Songo? Multaj ĉe mi." la maljunulo lip-tiriĝas je rideto; "Ĉe mi estas multaj songoj, kian vi volas?"

"Mi perdis flugeblan songon."

"Mi ne scias ĉu la songoj estas flugeblaj, tamen rigardu, ili estas diverskoloraj kun blindiga brileco. Vi povas elekti iun ajn el ili, kaj pagu por ĝi malpli multe." Li malfermas por mi la montrofenestron.

Sennombrajn songojn tie metas kiel varoj. Ja diversaj specoj: iuj kun serioza mieno, aliaj kun brila koloro; ies rido estas ravita, alies aspekto estas mizera kaj kompatiga. Sed neniu el la songoj estas flugebla.

Mi malespere skuas la kapon, ĉar mi ne povas trovi kion mi perdis.

"Elektu unu laŭplaĉe, ĉu ne estus unu kontenta por vi el ili?" afable demandas la maljunulo.

"Ne troviĝas. Mi nur serĉas la perditan de mi, aliajn mi tute ne volas!"

"Sed al kie vi serĉas la vian sonĝon en la vasta kampo? Junulo, mi devas doni al vi admonon, ke la perdita sonĝo ne retroveblas."

"Mi nepre serĉas ĝin! Mi nepre retrovos tion, kion perdis mi!"

"Kial vi estas tiel obstina, malsaĝulo?" mokas la maljunulo, "Kiom da homoj priserĉis la perditajn sonĝojn, tamen ĉu vi vidas, kiu retrovis sian sonĝon? Obeu min, reiru hejmen por bone dormi."

Sed mi daŭre iras antaŭen.

Nebulo maldensiĝas iom post iom, kaj mi vidas ke rivero baras la vojon antaŭ mi.

Mi ekhezitas, kiel mi atingos la transan bordon sen ŝipo?

Subite albordiĝas ligna boato, kiun antaŭenpuŝas per hokstango unu knabo en la aĝo ĉirkaŭ 17-18 jaroj, kun laŭta krio: "transiru!"

Mi tuj ensaltas en la boaton kaj urĝas lin antaŭenpuŝi kiel plej rapide.

"Maljuna sinjoro, kial vi estas tiel malpacienca? Ĉu estas grava afero por vi en la meznokto?"

"Kial la knabo titolas min 'maljuna sinjoro'? Antaŭ momento mi estis vokita 'junulo', ĉu mia aĝo pliiĝus multe dum tiel mallonga tempo?"

Mi ne havas tempon por disputi kun li, kaj nur demandas:

"He! Ĉu vi vidis mian perditan sonĝon, kiu povas flugi?"

La knabo senzorge respondas: "Mi vidis multe da sonĝoj ĉi tie, tamen kiu estas via? Se temas pri flugebla, ili ĉiuj transflugis sur la rivero, kaj neniu enfalis duonvoje en la rivero."

"Mia sonĝo estas tre brila, brila ol ĉio."

"Krom steloj mi ne vidis pli brilajn objektojn. Evidente via sonĝo ne alflugis al ĉi tie, ĉar la sonĝoj viditaj de mi tute estas ombroj senbrilaj."

"Ĉu vi povus diri al mi, kien ĝi flugis?"

"Mi ne povas, sed mi scias ke ĝi certe ne estas en la transa bordo, mi konsilas ke vi ne iru tien."

"Mi nepre iras al tie. Bovolu tuj sendi min al la transa bordo, mi volonte pagas al vi ĉian koston."

La knabo sendas min al la transa bordo.

Sen nebulo. La ĉielo pluvetas. Mi iras sur la glita kotvojo. Kelkfoje mi falis sur la vojo, tamen mi restaris denove, frotante la vundon mi plu antaŭeniras pli atente.

Staras antaŭ mi alta monto, kiu estas ne rampebla ŝtona monto, sen grundo kaj sen arbo.

"Ĉu mi sinturnas kun malplenaj manoj?" Mi hezitas.

"Ne, vi ne povas!" Mi aŭdis la propran voĉon de mia koro.

"Junulo ne povas preni la vojon de reveno." Tiel diris mia koro.

Mi kuraĝiĝis grimpi al rokoj unu post alia, ĝis miaj manoj sangis, piedoj ŝvelis, kaj kruroj malfortiĝis, dum mi ankoraŭ supren grimpas.

En kelkaj fojoj mi perdis la kuraĝon antaŭ ol retrovi ĝin; en pluraj fojoj mi haltis, ĝis mi plu suprengrimis; kaj eĉ momentojn, kiam mi apenaŭ defalis, mi haste ekkaptis la randon de roko. Finfine mi staras sur la la monta pinto kun laca korpo kaj ĉifonaj vestoj. Mi ankoraŭ ne vidas la perditan sonĝon.

Supre estas senlima ĉielo, kaj malsupre estas la maro de nubo kaj nebulo. En tia granda spaco nur unu akcipitro giras sur mia kapo.

Miaj rigardoj turniĝadas sekve de la flugiloj de akcipitro. Mi envias ke ĝi povas tiel libere ŝvebi en senlima ĉielo-maro. Foje ĝi flugas supren kaj fariĝas nigra punkto, aliffoje ĝi flugas malsupren, eĉ la du flugiloj tuŝetis mian kapon. Mi vidas ke ĝia akra beko malfermiĝas kaj longe kriĉas kvazaŭ mokado.

Ĝi certe mokas ke mi povas fari nenion starante sur la monta pinto, probable ĝuste ĝi forkaptis mian sonĝon. Tial kiam ĝi duafoje tuŝ-flugas mian kapon, mi kolere etendas mian manon por kapti ĝiajn ungojn. Mi kaptas la akcipitron, sed unu transkapiĝo faligas min de la monta pinto...

Mi malfermas la okulojn kaj malkovras, ke mi restas en mia propra hejmo. Efektive mi reperdas unu sonĝon.

En novembro 1941, Guilin
(tradukita de **Deodaro**)

100 个必会热词

Cent furoraj vortogrupoj nepre posedataj

熊林平 译

- 001 中国梦 la revo de Ĉinio
- 002 不忘初心 sin teni je la origina intenco (ĵurpromeso) / ne forgesi la komencan deziron
- 003 两个一百年 du centjar-celoj / du celoj destinitaj por atingi ĉiun dum cent jaroj
- 004 新常态 nova normalo / nova normala stato
- 005 中国制造 2025 fabrikita en Ĉinio 2025
- 006 “双一流” duobla unuaklaseco / iniciatemo je duobla unuaklaseco
- 007 工匠精神 la spirito de majstreco / majstrometiista spirito
- 008 中国天眼：500 米口径球面射电望远镜 (FAST) la Ĉiela Okulo de Ĉinio (la Sfera Radioteleskopo kun Kvincent-metra Aperturo)
- 009 歼 20 隐形战机 kaŝema ĉasaviadilo J-20 / detekt-evita ĉasaviadilo J-20
- 010 国产航母 aviadilŝipo konstruita de Ĉinio
- 011 国产客机 pasaĝeraviadilo fabrikita de Ĉinio
- 012 可燃冰试采 provekspluatado de bruligebla glacio
- 013 量子卫星 “墨子号” la kvantuma satelito “Mozi”
- 014 北斗卫星导航系统 la satelita navigosistemo Beidou
- 015 风云四号 A 星卫星 la satelito Fengyun-A4
- 016 重型运载火箭 pez-tipa portoraketo
- 017 沪港通 interligiĝo de akci-borsoj inter Ŝanhajo kaj Honkongo / transakcio-interligiĝo inter Ŝanhaja kaj Honkonga akci-borsoj
- 018 深港通 interligiĝo de akci-borsoj inter Shenzhen kaj Honkongo / transakcio-interligiĝo inter Shenzhen-a kaj Honkonga akci-borsoj
- 019 京津冀一体化 integriĝo de Pekino, Tianjin kaj Hebei / Pekino-Tianjin-Hebei-a integriĝo
- 020 雄安新区 la nova distrikto Xiong'an
- 021 自贸试验区 prova zono de libera komerco
- 022 医疗改革 medicinsistema reformado
- 023 供给侧改革 proviz-flanka reformado

- 024 扫脸支付 pagado per vizaĝ-skano (skano de vizaĝo)
- 025 二维码支付 pagado per dudimensia strikodo (strekokodo, matricokodo)
- 026 人工智能 artefarita intelekto
- 027 虚拟现实 virtuala realo
- 028 5G 时代 5G-epoko (epoko de la kvina generacio)
- 029 分享经济 dividebla (kunĝua) ekonomio
- 030 互联网金融 interreta financo
- 031 亚投行 Azia Infrastruktura Invest-Banko (AIIB)
- 032 低碳城市 malaltkarbona urbo
- 033 一小时通勤圈 cirklo de trafiko en unu horo / cirklo de unuhora trafiko
- 034 蓝色经济 blua ekonomio / ekonomio de oceano (mara sfero)
- 035 纵向横向经济轴带 ekonomiaj zonoj ĉe intersekcoj de nord-sudaj kaj orient-okcidentaj linioj / ekonomiaj zonoj ĉe nord-sudaj kaj orient-okcidentaj intersekcoj
- 036 众创、众包、众扶、众筹 amasa novigado, amasa task-plenumado, amasa subtenado kaj amasa mon-kolektado
- 037 战略性新兴产业 novaj (ekonomiaj) sektoroj de strategia graveco
- 038 香港回归祖国 20 周年 la 20a datreveno de la reveno de Honkongo al Ĉinio
- 039 点赞 doni ŝaton (laŭdon, dikfingron)
- 040 自媒体 memmedio / ni-komunikilo
- 041 实名认证 vernoma aŭtentigo
- 042 精准扶贫 laŭcela redukto de malriĉeco / alcela mizer-redukto
- 043 精准医疗 precizigo de medicino
- 044 利益共同体 komunumo de komunaj (divideblaj) interesoj
- 045 轨道交通 traka trafiko
- 046 动车 motorvagonaro / kugla trajno (vagonaro)
- 047 城际列车 interurba trajno
- 048 “一带一路”倡议 la iniciato pri “Unu Zono kaj Unu Vojo”
- 049 “丝绸之路经济带” la ekonomia zono laŭlonge de la Silka Vojo
- 050 21 世纪海上丝绸之路 la 21a-jarcenta Surmara Silka Vojo
- 051 古丝绸之路 la antikva Silka Vojo
- 052 互联互通 starigi kaj plifortigi la kunlaboron kaj la interrilatojn / interligiĝi kaj interkomunikiĝi
- 053 文化自信 kultura memfido
- 054 新型大国关系 novtipaj rilatoj inter grandaj potencoj
- 055 可替代能源汽车 aŭtomobilo de alternativa energio
- 056 可载人无人机 pasaĝerporta senpilota aviadilo (aerveturilo)

- 057 空中上网服务 enaviadila (enaera) vifi-servo
058 海外代购 transmara (translandlima) aĉetado pere de agento
059 海淘 translandlima ret-aĉetado (perreta aĉetado)
060 多次往返签证 vizo (valida) por pluraj eniroj kaj eliroj
061 散客 individua (okaza) vojaĝanto (turisto)
062 自由行 libera vojaĝo
063 跟团游 karavana (grupa) turismado
064 深度游 ĝisfunda (esplorcela) vojaĝo
065 自驾游 memstira turismado / vojaĝi mem kondukante sian aŭtomobilon / fari vojaĝon per sia aŭtomobilo
066 免税店 butiko doganlibera / impostolibera (senimposta) butikoj
067 无现金支付 senmona (senkontantaĵa) pagado
068 旺季 ĉefsezono / vigla sezono
069 淡季 morta (malvigla) sezono
070 反腐剧 kontraŭkorupta televidoserio / televidoserio kun la temo pri la batalo kontraŭ koruptado
071 合拍片 kunproduktado (de filmo)
072 打车软件 apo por voki taksion / taksi-voka apo (aplika programaro)
073 代驾服务业 servo de anstataŭa ŝoforado (servo de kondukado de aŭtomobilo fare de sobra profesia ŝoforo por sekure rehejmigi la drinkinton)
074 单双号限行 trafiko limigita laŭ nepara aŭ para numero sur licencplato / trafiko limigita surbaze de la par-aŭ-nepar-numera licencplato
075 共享汽车 komunuza aŭto / kunĝua aŭtomobilo
076 绿色金融改革创新试验区 prova zono de reformo kaj novigo por verda financo / prova zono por verd-financaj reformado kaj novokreado
077 超国民待遇 superŝtatana traktado
078 现代医院管理制度 administra sistemo de moderna hospitalo
079 机遇之城 urbo de ŝanco / urbo favorata de bona okazo
080 直播经济 ekonomio pri la rekta elsendo (en televido aŭ interreto)
081 互联网+政务服务 interreto plus registraj servoj
082 创新型政府 novokreiva registaro
083 无人机紧急救援队 urĝsava (sukura) teamo kun senpilota aviadilo / teamo por sukuri (urĝe savi) per senpilota aerveturilo
084 二胎经济 dua-infana ekonomio
085 父亲假; 陪产假 forpermeso al patro / patro-forpermeso (forpermeso donita al la patro por prizorgo de la akuŝinta patrino)
086 带薪休假 feriado kun salajro / pagata libertempo / pagataj ferioj

- 087 低头族 poŝtelefono-maniulo (kiu ĉiam klinas la kapon super sia poŝtelefono)
088 副中心 subcentro
089 用了洪荒之力 streĉi sian praforton / streĉi ĉiujn siajn fortojn / doni sian plenan energion / elspezi sian inundecan forton
090 营改增 substitui aldonvaloran imposton al la transakcia / anstataŭigo de vendimposto (imposto laŭ la cifero de komerco) per aldonvalora imposto
091 创新型人才 iniciatema (novokrea) talentulo
092 积分落户制度 domicil-sistemo bazita sur poentoj (poent-akumulado)
093 混合所有制改革 reformado de miksitaj posed-sistemoj (proprietoj)
094 税收减免 reduktado de kaj liberigo je imposto
095 生态保护红线 la ruĝa (plej malalta) linio por la ekologia protekto (por la naturprotektado)
096 网约车 taksio perrete alvokata / perreta taksi-voko / voki taksion perrete
097 宜居城市 urbo bone loĝebla / loĝ-agrabla urbo
098 移动支付 pagado per movebla aparato (poŝtelefono k.s.)
099 电子竞技 elektronika sporto
100 双创人才 talentulo por novokreo kaj entrepreno-fondo

说明：十九大期间，网上出现了《100个必会热词翻译》（中英文对照）。有朋友建议我把它翻译成世界语，看过之后，我觉得有这个必要，于是有了现在的这个汉语-世界语对照版的《100个必会热词》。

在稿件的修改过程中得到了王崇芳老师和魏以达老师的大力支持和帮助，他们提出了许多中肯的修改意见和建议。在此，向两位老师表示真诚的感谢。

（译者系中国国际广播电台世界语部编辑）



缅怀迟铁男先生

山西 赵云峰

我认识迟铁男也好多年了，因为几乎我每次参加世界语会议，都能见到他的身影，他每次会议总背着一个相机义务给大家照相。在一次饭局的人中他排行老二，因此我也习惯跟着大伙称呼他二哥。他是对世界语事业执着的人，每次全协发通知召开世界语会议时，他总是发邮件问我是否参加。他还经常通过邮箱发世界语资料给我。他生活简朴、性格开朗。他多次会议是住在外面的。有一次开会时我见他还拖着行李箱，我说我一人住着一个房间，你把行李先放在我房间里，安心开会吧。他放包时我看到他包里放着几个干饼子，心里一阵酸楚，为了多参加几次世界语会议，他生活就这么简单。晚上七点他要拿上行李回他住的地方，我说晚上还有活动，参加完再回。他说住的比较远，怕没车了。我给了他一百元打的费，让他安心参加活动，等活动结束后打的回去。这样他参加完活动才拿上行李回住处。去年泉州会议见面时，他给我带了一小包当地磨制的黑豆芝麻粉，我笑着说不要了，让他自己留着喝，他执意要给，我就收下了。这就是他给我最后的礼物。

当得知他今年四月份就已经病故，很是伤感。这么一个朴朴实实、懂得感恩的人，就这样默默地走了，而且年龄也不大。

人是脆弱的。迟二哥的离世，让我想起了杨海春老师在山西世界语公益群教的世界语课中的《在山谷里》《教堂》一文中的场景和内容，该文讲透了人生的真谛。人生不易，我们只有珍惜现在的一切，活在当下，关注健康，好好活着。

迟嫂我也认识，因她也经常参加世界语会议，愿迟嫂坚强些，节哀顺变。

迟铁南同志一路走好！



我们的生活充满阳光

侯志平

我们的生活充满阳光，
从城市到村庄，从内地到边疆，
到处都呈现出繁忙的景象，
人们在用汗水铸就祖国的辉煌。

我们的生活充满阳光，
农业现代化满载着希望，
粮食丰收，百业兴旺，
八亿农民功德无量。

我们的生活充满阳光，
一批批名牌待装出航，
中国制造，享誉四方，
订单如流，齐声赞扬。

我们的生活充满阳光，
公路和铁路连着穷乡僻壤，
自产的汽车、高铁，
奔驰在祖国的大地上。

我们的生活充满阳光，
国内国际航线密如蛛网，
中国制造的大飞机，
在万里晴空中翱翔。

我们的生活充满阳光，
“嫦娥”奔月，“玉兔”返乡，
探测宇宙深空，心驰神往，
正在实现千百年来的梦想。

我们的生活充满阳光，
祖国的远洋巨轮和科考船队，
在全球的海洋上劈波斩浪，
丰硕的科研成果让人荡气回肠。

我们的生活充满阳光，
南海诸岛建设谱写着新的华章，
机场、海港、航标举世瞩目，
祖国的领土怎能让他国哄抢！

我们的生活充满阳光，
城镇化的蓝图已跃然纸上，
农民工的子女就近上学，
同样有机会走进大学的殿堂。

我们的生活充满阳光，
扶贫攻坚战已经打响，
捷报频传，战果辉煌，
将把贫穷彻底地埋葬。

我们的生活充满阳光，
正在进行的医疗改革，
城乡统筹，全民共享，
防病治病更有保障。

我们的生活充满阳光，
棚户区的改造不负众望，
数以百万户的平民百姓，
搬进现代化的舒适楼房。

我们的生活充满阳光，
网购送货的三轮车，
在城乡社区日夜奔忙，
幸福的生活更甜更香。

我们的生活充满阳光，
留学的队伍浩浩荡荡，
学成归来，报效祖国，
爱国情怀，源远流长。

我们的生活充满阳光，
旅游团队遍及四面八方，
观光购物在异国他乡，
自豪自信写在中国人的脸上。

我们的生活充满阳光，
“一带一路”正在起航，
我们要与各国人民真诚合作，
实现共建、共赢、共享。

我们的生活充满阳光，
反腐倡廉风清月朗，
打虎拍蝇布下天罗地网，
让腐败分子无处躲藏。

我们的生活充满阳光，
党带领我们奋发图强，
民族复兴，全民小康，
中华伟业，万古流芳。

(作者系中华世协理事，中国世界语史专家。)

★ 7月9日，郑州市世界语者举行纪念世界语诞生130周年座谈会。郭喜照、马海滨、孔雷、唐洛、王瑞、赵华等出席，会上传阅了《河南世界语运动简史》样书。



★ 7月20日，河南世界语者联盟举行网络会议，研究通过了第2届河南世界语者大会的主题、日程安排等有关事宜。

★ 8月，河南世界语者联盟主办的《Flava Rivero》(黄河)电子版刊物正式网络上线创刊。

★ 9月，经过安阳世界语者的多方努力，终于确定了第2届河南世界语者大会的会场。河南世界语者联盟据此发出了会议通知。

★ 10月，侯志平、李建华主编的《中国世界语人名录》由山东大学出版社出版，河南世界语者提供了有关人物材料。

★ 10月20日—22日，第2届河南世界语者大会在安阳举行，安阳、开封、郑州、洛阳、新乡等地的世界语者参加了会议。

★ 11月3日—5日，第2届五省市世界语论坛在上海举行。河南世界语者刘家和、孔雷、王宝生、赵华、贾荣霞、赵爱华等参加。

Kio estas Henan-a lingvo?

Wang Tianyi


Kio estas Henan-a lingvo?
什么是河南话?

Omaĝe al Dua Henan-a Esperantista
Kongreso en la urbo Anyang



Kie situas Henan en la mondo?
河南在哪里?

Henan situas inter la norda latitudo 31°23' -36°22' kaj la orienta longitudo 110°21' -116°39' en la mezo de la Azia oriento. Ĝi apartnas al la mezvarma terzono influita de Pacifiko.
河南省界于北纬31° 23'-36° 22',东经110° 21'-116° 39'之间的东亚中部。它属于受太平洋气流影响的暖温带地理。



Henan situas meze de la Orienta Azio
河南地处东亚的中部



Kia lingvo devas esti en Henan?
河南应该说什么样的语言?



La monda lingvaro konsistas el tri specaj lingvoj kongruaj kun propraj geografioj sen konsidero de diversaj migrintoj, kiuj korektis la lingvan mapon:

- Varmeca** kiel la ĉina mandareno kun tonoj
- Mezvarmeca** kiel la hind-eŭropa je fleksivo
- Malvarmeca** kiel la altaĵa je aglutineco

世界语言如果不考虑各种移民对语言地图的修改，它组成于不同地理因素对应的三种类型：

- 像中国普通话那样带声调的**热带语言**
 - 像印欧语言那样内部曲折的**温带语言**
 - 像阿尔泰语那样外部黏着的**寒带语言**
- Henan situas en la mezvarma terzono. Ĝia lingvo apartenas al la **fleksiva**.
河南地处温暖地理带。它的语言属于**屈折语**。

Kompare kun Ŝensi-a lingvo
河南话与陕西话比较



<div style="display: flex; justify-content: space-around;"> <div style="border: 1px solid black; padding: 5px; width: 45%;"> <p style="text-align: center; background-color: #4a7ebb; color: white; padding: 2px;">大爷 (Daj) Plej aĝa onklo</p> <ul style="list-style-type: none"> <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">大爷 (Da) Sekva onklo <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">爹 (Dje) Patro <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">老大 (Da) Plej juna onklo <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">单尔(Dar) Edzino de pli aĝa onklo </div> <div style="border: 1px solid black; padding: 5px; width: 45%;"> <p style="text-align: center; background-color: #4a7ebb; color: white; padding: 2px;">大爸 (DaBa) Plej aĝa onklo</p> <ul style="list-style-type: none"> <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">二爸 (ErBa) Dua onklo <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">我爸 (Uoba) Patro <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">五爸(PoNjang) Kvina onklo <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">大妈(DaMa) Plej aĝa onkline </div> </div>	<div style="display: flex; justify-content: space-around;"> <div style="border: 1px solid black; padding: 5px; width: 45%;"> <p style="text-align: center; background-color: #4a7ebb; color: white; padding: 2px;">我吃饭 Mi manĝas manĝon</p> <ul style="list-style-type: none"> <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">你吃饭否? Ĉu vi manĝis aŭ ne? <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">我有吃饭 Mi ne manĝas. <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">冇吃 (chi), chāo, chāo! Ne manĝis, manĝu, manĝu! <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">这饭真好吃 Ĉi tiu manĝo vere estas bongusta </div> <div style="border: 1px solid black; padding: 5px; width: 45%;"> <p style="text-align: center; background-color: #4a7ebb; color: white; padding: 2px;">我把饭吃一下 Mi manĝon manĝas</p> <ul style="list-style-type: none"> <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">你把饭吃咧没有? Ĉu vi manĝon manĝis ne? <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">我把饭还没有吃哩 Mi manĝon ankoraŭ ne manĝis. <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">莫吃哩, 请把饭吃些子 Ne manĝis, bonvolu manĝon manĝi! <li style="border: 1px solid black; padding: 5px; margin-bottom: 5px; text-align: center;">这饭好地太太 Ĉi tiu manĝo estas bongusta plej plej. </div> </div> <p style="font-size: small; margin-top: 10px;">Klare la parola arango de Shaanxi estas mongoleska kompare kun la parola de Henan. 陕西话的句式与河南话比较明显是蒙古语 (主宾谓) 格式的 (副词后置) 句子。</p>
<p style="text-align: center;">Kial ambaŭ ne estas samaj lingvoj? 为什么两者不是同样的语言</p> <p>Fakte ŝensi situas ankaŭ en la mezvarma terzono, sed ĝi apartenas al la aglutina lingvo. Tio montras, ke ili estas migrintoj el la norda regiono malvarma kiel mongoloj, kunportinte sian lingvon aglutina, manĝ-ajon supŝafaĵo kaj kulturon stepeska. Praloĝintaro kiel Henan-anoj jam malaperis aŭ fuĝis.</p> <p>实际上陕西也处于温暖地理带, 但它的语言属于黏着语。这表明它来自像蒙古那样的北部寒冷地区, 携带着自己的黏着语言、羊肉泡馍食品和草原文化。而远古时期的河南原住民覆灭或逃跑了。</p>	<p style="text-align: center;">Kion signifas la tradicia frazo en Henan? 这句河南老话是什么意思?</p> <p>Prenu kokegon kaj manĝu kokon. (ne kokidon). 捉个鸡 (Jju), 吃鸡 (Ji) 肉。(不是鸡仔Ji肉)。</p> <p>La vortomo estas fleksiva inter la kokecoj majjuna(granda), juna kaj ida. La frazo esprimas ke gastiganto deziras preni grandan kokon, kaj timas ke gasto imagas ke la koko estas majjuna, ĉar Jiu ankaŭ kokumas majjunan krom la granda. Per tia frazo la gastiganto volas esprimi, ke kvankam prenu tian Jju (鸡), sed ĝia viando estas juna kiel Ji (鸡) .</p> <p>该词屈折变化为老(大)、成熟和小的鸡之间的不同词性。表明主人有意捉个大的鸡, 又担心客人以为该鸡老肉柴, 因为鸡 (Jju) 除过大还有老的意思。用那样的句子主人主要说明</p> <p>虽然捉的鸡大,但不是老鸡 (Jju),它是肉嫩的成熟鸡 (Ji) 。</p>
<p style="text-align: center;">Fleksivaj vortoj estas baze de la ĉina lingvo 中国语言的基础的屈折词汇</p> <p>Henan estas originala loko de Ĉinio, sed ĝia lingvaĵo fleksiva ne gvidas la ĉinan lingvon. Hodiaŭ la ĉina lingvo toneca apartenas al la lingvo suda kaj varmea. Tamen el bazaj vortoj ni scias ke la fleksiva lingvo de Henan iam profunde influis la ĉinan lingvon, ekzemple: He(rivero), Hu(lago), Hai(maro), Hun(malklaro), Hong(torento); Shan(monto), Shen(superulo), Sheng(sankta); Ce(frato), Gu(pli aĝa frato?);</p> <p>河南是中国的发祥地, 但它的屈折语现在没有主导现代汉语。今天带声调的中国话属于南方热带地区语言。但是从一些汉语基础词中我们可以看出河南屈折语的影响, 例如: He(河), Hu(湖), Hai(海), Hun(混), Hong(洪); Shan(山), Shen(神), Sheng(圣); Ce(哥哥), Gu(姑姑?姐姐?);</p>	<p style="text-align: center;">Resumo 总结</p> <p>Fakte hodiaŭa ĉinlingvo estas profunde miksita de diversaj lingvoj eĉ ankaŭ okcidenta lingvo. Tamen la ĉina skriblingvo estas klare naskiĝinta en fina-meza regiono de la Flava Rivero. Ĝia aspekto estas ideo-grafiaj 图, kio originas en la centra parto Henan, kaj interna konsistaĵo venas de priskri-baj strekaĵoj en la meza parto Ŝensi kalkulaĵoj en la fina parto Ŝandon. La ĉina civilizacio havas akcepteman karakterizon ankaŭ je la lingvo. Ĉu ne?</p> <p>实际上, 今天的中国话是各种语言甚至包括西方混合而成。然而中国的文字明显诞生在黄河的中下游地区。它的象形外观起源于黄河中心河南“国”, 而内部组成含有黄河中西部陕西的刻划字符, ㄣ × + 1 十 7 : 和黄河下游山东的算筹</p> <p style="text-align: center;">- = 三 三 三 三 三 三 三</p> <p>Fine, mi dankas vian aŭskultadon, kaj deziras plenan sukceson al La 2-a Henan-a Esperantista Kongreso!</p>